

# FLANDRA ESPERANTISTO

MONATA REVUO

ORGANO DE LA FLANDRA  
ESPERANTO  
MOVADO



Officieel Orgaan

van den

Vlaamschen  
Esperantisten-  
Bond



eN.E.L.E.\* (Nia Estas La Estonteco)  
Flandra Esperantista Grupo  
Ejo \* Breùghel \*  
Een. Jacquainlaan, 37, Brussel (Belg.)

---

---

# GRANDA LIBRO - LOTERIO

## DE FLANDRA ESPERANTO - INSTITUTO

En ĉi tiu loterio, organizita okaze de la libro-tago, estas 1.000 lotoj kaj 50 tre havindaj libro-premioj en valoro de entute 1.000 frankoj.

La prezo de unu loto estas nur 1 franko!

Inter la 50 premioj estas multaj grandaj, belaj, multekostaj libroj, veraj fieraĵoj de nia juna, sed rapide kreskanta Esperanto-literaturo. Multaj Esperantistoj ne povas aĉeti la gravajn verkojn, pro monmanko. Ĉiuj nun havas la okazon gajni valoran vortaron, studlibron aŭ mondfaman literaturan verkon por eta sumo.

### LISTO de la PREMIOJ :

1. Plena Vortaro de Esperanto. 511 paĝoj. Bindita
2. Groot Woordenboek Van Straaten. 688 paĝoj. Bindita
3. Beknopt Woordenboek Van Straaten. 715 paĝoj. Bindita
4. Tra la Labirinto de la E-Gramatiko. F. Faulhaber. 334 paĝoj. Bindita
5. Rembrandt, la Magiisto. Kun 100 bildoj. Lukse bindita.
6. Jane Eyre. Mondfama romano de Charlotte Bronte. 500 paĝoj. Bindita
7. Fundamenta Krestomatio. L. Zamenhof. 472 paĝoj. Bindita
8. Gösta Berling. Mondfama verko de S. Lagerlöf. Bele bindita
9. La Leono de Flandrujo. Historia romano de H. Conscience. Bindita
10. Quo Vadis. Mondkonata verko de H. Sienkiewicz. 2 Volumoj. Bindita
11. Ŝi. Romano de H. Rider Haggard. Bindita
12. La Ora Ŝtuparo. Romano de E. Phillips Oppenheim. Bindita
13. Riĉa kaj sen Mono. Romano de E. Phillips Oppenheim. Bindita
14. Gysbreght van Aemstel. Joost van den Vondel.
15. Maria kaj la Grupo. Originale Romano de J. Baghy.
16. Hura! J. Baghy. 411 paĝoj.
17. Viktimoj. J. Baghy. 240 paĝoj.
18. Verdaj Don Kihotoj. J. Baghy.
19. Robinsono Kruso. Bindita
20. Trans la Fabeloceano. Szilagyí.
21. Anni kaj Montmartre. R. Schwartz.
22. Stranga Butiko. R. Schwartz.
23. Konsilanto de la Gramatiko. Degenkamp.
24. Lingvo, Stilo, Formo. Kalocsay.
25. Inter la Flandroj. S. Stuit.
- 26, 27, 28, 29, 30. Ĉiutaga Vivo (Konversacioj).
- 31, 32, 33, 34, 35, Esperanto-Leerböck. F. Szilagyí. 200 ilustraties.
- 36, 37, 38, 39, 40, La Du Amatinoj. Romano de A. de Musset.
- 41, 42, 43, 44, 45, Elektitaj Noveloj. L. Baekelmans.
- 46, 47, 48, 49, 50, Granda bildo de D-ro Zamenhof. Arta eldono 36 x 28 cm. sur dika, glata papero.


Aĉetu viajn lotojn tuj, por ke la tirado povu okazi la **9-an de januaro 1938**, en la ligo kunveno: Elckerlijck, Korte Kruisstraat, Gent.

Mendu viajn lotojn al F. E. I. Magdalenastraat 29, Kortrijk, **antaŭpagante** pere de poŝtĉekkonto no. 3268.51.

---

---

# Flandra Esperantisto



Oficiala Organo de Flandra Ligo Esperantista  
Aperas ĉiumonate

ĉefredaktoro:  
A. Pittoors  
Ten Eeckhovelei, 125  
Deurne-Noord  
Antwerpen



Administranto:  
Adolf De Keyzer  
P. vanHumbeekstr., 3  
Brussel (West)

Jara abonprezo: 20 frankoj. — Eksterlando: 5 belgoj  
Kun membreco al F. L. E.: 25 fr.  
Eksterlando: 6 belgoj  
Poŝtĉeko: 2321.50 de F. L. E. Brussel.

## Aan de Radioluisteraars van het Nederlandsche taalgebied

Den 15 DECEMBER 1937, gedurende het Jeugduur van het N. I. R. (Brussel - Vlaamsch - Golfengte 321,9), dat te 17 uur aanvangt

### Opvoering

van

## "Het rijzen der Groene Ster"

*Hoorspel uit het leven van Dr. Zamenhof, schepper van het Esperanto.*

door

### Pol Van der Poel

(Medewerker aan Flandra Esperantisto)

Om het luisterspel beter te kunnen genieten, leest eerst het artikel «La Leviĝo de la Verda Stelo» in dit nummer.

Maakt propaganda bij vrienden en kennissen, opdat zij door de edele figuur van Dr. Zamenhof te leeren kennen en hoogschatten, ook den weg naar Esperanto zouden vinden.

Deelt uwe indrukken mede aan den leider van het jeugduur, den heer Jozef Contryn, N. I. R., Bolwerkstraat, 1a, te Brussel.

Ook het N. I. R. moet eindelijk vernemen dat de belangstelling voor het Esperanto en zijn beweging algemeen is.

\*N.E.L.E.\* (Nia Estas La Estonteco)  
Flandra Esperantista Grupo  
Ejo \* Breughel \*  
Km. Jacquainlaan, 37, Brussel (Belg.)

## ESPERANTO in de PRAKTIJK

---

HONGARYE. — Door de directie der Hongaarsche Staatspoorwegen werd officieel een Esperanto-kursus ingericht ten dienste van het treinpersoneel. De cursus wordt reeds door een vijftigtal personen gevolgd.

ITALIE. — Te Rome werd een Esperanto-handelsvereniging (E. K. A.) opgericht als doel hebbende, het Esperanto meer ingang te doen vinden in commercieele middens en internationale commercieele betrekkingen te vergemakkelijken. Een maandblad «EKA-bulteno» zal worden uitgegeven en kosteloos aan belanghebbenden gezonden. Adres: Via Nazionale 208, Roma.

Het bestuur der «Dopolavoro Marittimo» (Postbezigheden op zee) van den oceaanstoomer «Conte Grande» 25.600 ton, heeft ook het Esperanto op het leerplan geplaatst. Een cursus zal gegeven worden door Professor A. Stellacci, kapelaan op dit schip.

Het «Ksiloteko Cormio», te Milaan, een muzeum betreffende houtsoorten en zijne toepassingen, éénig in de wereld, gebruikt het Esperanto voor de verklaring der tentoongestelde voorwerpen.

YUGO-SLAVIE. — Door de Yugo-Slavische post-directie werd een officieel postzegelalbum uitgegeven, plaats biedende voor alle tot nu toe uitgekomen Yugo-Slavische postzegels. De verklarende tekst werd gedrukt in het Servisch, Kroatisch en Esperanto.

NEDERLAND. — Bij de Nederlandsche Vereeniging voor Vreemdelingenverkeer in Den Haag is een keurig boekje verschenen in Esperanto over de werken tot drooglegging der Zuiderzee. Het werkje is verlucht met een dertigtal mooie luchtfoto's.

Door de bekende Nederlandsche pedagoog, Cees Boeke, directeur van de leerschool «Werkplaats» te Utrecht werd het Esperanto als eerste vreemde taal op het leerprogramma geplaatst.

Speciale Esperanto-kursussen voor politie-agenten genieten een warme belangstelling in het land. Circa 300 politie-agenten volgen deze kursussen. Niet Nederlandsche politie-agenten-esperantisten die belang stellen in de heroprichting der Internationale Esperanto-politie-vereeniging wenden zich tot J. Th. De Goey, Luzacstraat 21a, Rotterdam.

RADIONIEUWS. — Na de succesvolle Esperanto uitzendingen in Oktober i.l. van de opera «De Kus» van Smetana door verschillende radio-stations (Lyon PTT alleen ontving 253 brieven van dank uit 21 landen) werden wij in November alweer vergast op Esperanto-luisterspelen door de radio-stations Brno (Tcheco-Slowakye), Ljublana (Yugo-Slavie) en voor de eerste maal in Frankrijk met een eigen programma door Radio-Parijs.

## LA LEVIĜO DE LA VERDA STELO

Ni, Esperantistoj, kiuj staras meze en la movado, kiuj entuziasme rigardas la disvolviĝon de Esperanto, sed kiuj ankaŭ de tag' al tago aŭdas la stultajn riproĉojn, la ridindajn kialojn, kiujn niaj malamikoj proklamas pri kaj kontraŭ nia kara lingvo, pri nia nobla celo, kaj eĉ pri nia granda Majstro Zamenhof, ni, Esperan-



*L. L. Zamenhof*

tistoj, mi diras, devas almarŝadi ŝultro kontraŭ ŝultro, seninterrompe, senhalte, ĉar ĉiu klopodo, granda aŭ malgranda, nepre alproksimigas la finan venkon.

Kaj tial, en tiu vintra monato, en tiu Zamenhof-monato, estas

bone mediti pri la vivo de l' grandanima kreinto de Esperanto, kaj freŝe rememori la cent malfacilaĵojn kiujn li devis trapasi, la veran tragedion, kiu estis lia vivo: tiu vivo kiu nur estis laborado, batalado, suferado, sed tamen ankaŭ verkado, ĉar vere, kaj tio estis, mi dirus, la nura feliĉo de lia vivo, li vidis efektive la levigon de la verda stelo.

Dro Ludoviko, Lazaro Zamenhof naskiĝis la 15-an de decembro 1859 en la urbo Bialystok, gubernio de Grodno, kiu tiam estis en Ruslando, sed depost la fino de la mondmilito kuŝas en la memstara Polujo. Tre juna jam la knabo estis rimarkinde kapbla. En la aĝo de kvar jaroj li bone legis kaj skribis, kaj dum la naŭ jaroj, ke li estis en gimnazio, li estis ĉiujare la unua de la klaso. En Bialystok loĝis polaj, rusaj, germanaj kaj judaj elementoj, kaj pro la nesufiĉa kono de la diversaj lingvoj ĉiam denove ekestis malfacilaĵoj kaj regis la malamo.

En 1873 Marko Zamenhof, lia patro iĝis inspektoro de privata lernejo en Warszawa, kaj sekve de tio, la familio translokiĝis. Ludoviko studadis la latinan kaj grekan lingvojn, sed la humanaj ideoj, kiujn la patro ekde la frua infaneco verŝis en lia animo, leviĝis en li la ideon pri monda lingvo.

Okazis ke li revis pri la ebleco ke unu el la ekzistantaj lingvoj fariĝus komuna, sed precipe pro la amaso da gramatikaj malfacilaĵoj, li konkludis ke tio estis nebla.

Li tamen ne senkuraĝiĝis, ĉar jam en 1878 li estis preta per tuta sistemo, kiun li propagandis inter siaj kolegoj. La tiam deknaŭjara studento organizis festeton en la hejmaj salonoj, kaj ĝoje pri la naskiĝo de la «Lingvo internacala» ili kantis ĥore:

Malamikete de las nacjes  
Kado, kado, jam temp' esta!  
La tot' homoze in familje  
Komunigare so deba!

Kio signifas en nia Esperanto:

«Malamikeco de la nacioj  
Falu, falu, jam tempo estas!  
La tuta homaro en familjon  
Unuiĝi devas».

Sed ege kontraŭstaris lin lia patro. Tio estis granda doloro por la bona filo, kaj plie la direktoro de l' gimnazio eĉ kvalifitis lian agadon kvazaŭ simptomon de komenciĝanta frenezo. Zamenhof devis promesi al sia patro ne publikigi verkojn pri internacia lingvo dum la periodo de liaj universitataj studoj. Dum du jaroj li estis en Moskvo studento en la medicina fakultato. Revenante al Warszawa, la patrino sciigis al li ke la patro forbruligis ĉiujn manuskriptojn.....

Sed ne gravis finfine: la lingvo de l' paco jam estis gravita en lia koro. Jam en 1881 li denove havis preskaŭ la saman lingvon kiel en 1878. Sed dum ses jaroj, (studanta nun en Warszawa) la nobla homo silentis, laŭ la promeso al la patro, sed li laboris, verkis, oferis ĉiujn siajn liberajn horojn al «sia lingvo».

En 1885 li estis kuracisto, sed nun komenciĝis dolora tempo, tempo de malriĉeco kaj vana laborserĉado. En 1886 li komencis



*Eni kolekte  
De prospekto  
Isolake libroj  
Por kolekte  
Kaj jen - in legendar  
Via libro legendar*

ESPERANTISTA DONACO  
pri kiu dum la tuta jaro me-  
moras via amiko:

abono al

LITERATURA MONDO

Specimeno: 2 fr., Abono por  
jaro: 65 fr.

LINGVO - LIBRO

informas vin pri ĉiu okazo en  
nia literaturo. Abonu ĝin kune  
kun viaj amikoj. Abonprezo :  
(tri ekz. kune) 8 fr.

Abonojn akceptas kaj speci-  
menojn sendas :

FLANDRA

ESPERANTO INSTITUTO

Magdalenastr. 29 Kortrijk. (P. K. 326.851).

okulistan praktikon post speciala studado en Wien.....

Sed nun la amo eniris la vivon de l' granda idealisto, li ren-  
kontis Klara Zilbernik, filino de komercisto el Kovno, kaj en la  
printempo de 1887 okazis la fianĉiĝo. Kaj kiel romantika povas  
ŝajni, per tiu amo leviĝis la verda stelo! Ĉar en Klara Zilbernik  
li trovis la idealan helpantinon, kiu tute lin komprenis kaj egale  
entuziasmiĝis pri lia nobla afero. Estis ŝi kiu pledis por la bela  
ideo ĉe sia patro, por ke li risku la monon por la eldonado de  
la unua broŝuro. Ĝi aperis la 26 de Julio 1887, mallonge antaŭ  
la edziĝo de Dro Zamenhof; kaj la titolo estis: Dro Esperanto. —  
Lingvo Internacia. «Antaŭ parolo kaj plena lernolibro por Rusoj».  
Sekvis baldaŭ eldonoj en la pola, franca, germana kaj angla ling-  
voj. Sed terura estis la materiala vivo por nia «idealista» doktoro.  
Li devis forlasi virinon kaj infanon por iri al Suda Ruslando espe-  
rante je pli fruktodonanta praktiko, sed tie en silento li vere su-  
feris malsategon.

En 1890 li revenis al Warszawa, sed dum jaroj ankoraŭ li  
bezonis la subtenon de sia bopatro.

Sed malgraŭ malriĉeco kaj ĉagreno dum siaj liberaj horoj li  
laboris por sia lingvo.

La pereco de Volapük, malhelpis certe la kreskadon de nia  
lingvo, kiu baldaŭ estis nomata «Esperanto» laŭ la pseŭdonimo  
de la kreinto.

En 1889 aperis unua listo kun 1000 nomoj de esperantistoj.  
En la sama jaro dum Novembro ekestis la unua esperanta gazeto  
en Nürnberg: «La Esperantisto». Malfeliĉe la fondinto L. Einstein  
baldaŭ mortis kaj estis Dro Zamenhof mem kiu devis prizorgi la  
eldonadon. Sed la elspezoj tuj estis pli grandaj ol la enspezoj, kaj  
certe la gazeto estis malaperanta, se ne nova idealisto H. H. Trom-  
peter el Westfalen (Germanujo) estis prenanta sur si la taskon.  
«Li savis la Esperanto-aferon de la morto», poste la majstro ates-  
tis pri li.

Estos tro ampleksa ĉi-tie citi ĉion kio estas rimarkinda. Feliĉe en multaj landoj la verda grejno finfine kreskis kaj jam floretis, kaj en 1905, kiam ankaŭ la privata vivo de Dro Zamenhof plifavoriĝis, li kaj lia edzino aŭdis el la buŝoj de 800 gekongresanoj el 30 landoj la kanton de la Espero, dum la unua kongreso de Esperanto en Boulogne-sur-Mer.

Ne estas eble pritrakti detale la naŭ kongresojn, kiuj sin sekvis de 1905 ĝis 1913. Sed por ke vi bone komprenu kion Dro Zamenhof lernis al ni kaj indikis kiel la esenco de nia komuna idealo, ni citas ĉi-tie kelkajn el liaj ideoj:

«Ni kunvenas hodiaŭ por montri al la mondo per faktoj nerefuteblaj tion, kion la mondo ĝis nun ne volis kredi. Ĉiu, kiu diras ke neŭtrala lingvo estas ne ebla, venu al ni, kaj li konvertiĝos. Li promenadu en la venontaj tagoj en la stratoj de Bulonjo-sur-Mar, li observadu kiel bonege sin komprenas reciproke la reprezentantoj de la plej diversaj nacioj».

(Unua kongreso de E. en Boulogne-sur-Mer).

«Bedaŭrinde en la lasta tempo inter Esperantistoj aperis tiaj voĉoj, kiuj diras: Esperanto estas nur lingvo: evitu ligi eĉ tute private la Esperantismon kun la ideo. Ho kiaj vortoj!... Kun energio ni protestas kontraŭ tiu postulo. Se ni, la unuajn batalantojn por Esperanto, oni devigos, ke ni evitu en nia agado ĉion idean, ni indigne disŝiros kaj bruligos ĉion, kion ni skribis por Esperanto, ni neniigos kun doloro la laborojn kaj oferojn de nia tuta vivo, ni forĵetos malproksimen la verdan stelon, kiu sidas sur nia brusto, kaj ni ekkrios kun abomeno: Kun tia Esperanto, kiu devas servi ekskluzive nur al celoj de komerco kaj praktika utileco, ni volas havi nenion komunan!» «Tiu ideo kion ni ne volas forlasi estas FRATECO KAJ JUSTECO INTER ĈIUJ POPOLOJ.

(Dua kongreso de Esperanto en Geneve).

En 1914 la kongreso devis okazi en Parizo. Jam 5000 estis sin anoncintaj.

Kiam Doktoro Zamenhof atingis Köln, la landlimoj estis fermataj pro la ĝenerala mobilizado. Lia alvoko «Al Parizo!» estis por la paco... sed tie eksonis milita «Nach Paris!»..... Jam kormalsana, Dro Zamenhof devis returniĝi laŭ Berlin, Danujo, Svedujo kaj Finnlando al Warszawa.

La movado estis kvazaŭ paralizigita. Sovaĝa kanonado kaj bestaj krioj anstataŭigis la kanton de l' Espero.

Dro Zamenhof tamen ne ripozis. Li finis la tradukon de la malnova testamento kaj kvar libroj fabeloj de Andersen. Li verkis alvokon al la diplomatoj atentigante ilin je la plej granda devo: «Tiel longa tempe popolo subpremas alian ne venos la Paco».

Sed li ne vidis la finon de la buĉado. La 14-an de Aprilo 1917, senfortigita per la longdaŭra kormalsano, Dro Zamenhof mortis. Pro la milita tempo nur kelkaj polaj amikoj povis akompani la ĉerkon al la tombejo. La miloj el la granda rondo familia ne povis diri adiaŭon, ĉar batalfrontoj kaj landlimoj malebligis vojaĝojn.

Li mortis plenkonscie, esperante al la venko de sia humana,



bela ideo, de sia nedettruebla realeco.

Kaj tiu espero realiĝas! En ĉiuj landoj de la mondoj, trans dezertoj kaj oceanoj aŭdiĝas la lingvo internacia Esperanto, kaj centoj da miloj entuziasme admiras la senhaltigeblan leviĝon de la verda stelo...

La problemo de la mondlingvo ESTAS SOLVITA!

*Pol van der Poel.*

---

## **Komunikoj de la Estraro**

---

### **BESTUURSVERGADERING.**

Het bestuur van F. L. E. vergaderde op 6 November te Brusel. Besluiten werden getroffen betreffende technische verbeteringen aan F. E. In verstandhouding met het congrescomité werd het bedrag der deelnemingskaart voor ons 9-de congres vastgesteld. Ten einde de taak van den Algemeen-Sekretaris gedurende de bondsvergaderingen te vergemakkelijken, werd een verslaggever aangesteld. Tot de uitgave van een zakwoordenboekje van plus minus 80 bladz., van een beeltenis van Dr. Zamenhof en van een propaganda-kalendertje werd besloten. Een tweede druk (tweede drieduizendtal) van onze propagandabrochure «Waarom Esperanto?» zal verschijnen. Ter gelegenheid van de libro tago zal een boeken-loterij door F. E. I. worden ingericht.

### **NIEUWE AFDEELING.**

Een nieuwe afdeling werd opgericht, nl. Mol (Esperantista Grupo). Wij heeten haar van harte welkom!

### **VOLGENDE BONDSVERGADERING**

wordt op 9 Januari te Gent gehouden. Voorstellen voor de dagorde zendt men zoo mogelijk vóór 15 December aan bondssektaris.

### **BEELTENIS Dr. ZAMENHOF.**

is nu bij F. E. I. verkrijgbaar, formaat 36 X 28,5 cm. prijs: 7,50 fr.; op postkaartformaat: 1 fr. Het is een goed uitgevoerde en welgelijkende tekening (zie reproductie in dit blad). Warm aanbevelen in de eerste plaats voor clublokalen, maar ook aan onze leden zelf! De verzending geschiedt in een speciale, onkreukbare verpakking.

### **ONS PROPAGANDA-KALENDERTJE.**

Ieder jaar wordt door F. E. I. een propaganda-kalendertje gratis verspreid. Dit jaar is ons kalendertje buitengewoon keurig uitgegeven. Het verscheen op 3000 ex. en werd voor enkele dagen aan onze afdelingen en vertegenwoordigers gezonden.

### **ONS 9-de CONGRES TE BRUGGE 1938.**

Het congrescomité werd als volgt samengesteld: Voorzitter: F. Roose; Sekretaris: R. Iserentant; Penningmeester: M. Vincke; Raadgevend bestuurslid: K. Van den Bussche. Adres van het sekretariaat: Komvest 70, Brugge. Kongreskaart: 15 fr., voor F. L.

E.-leden: 12 fr. Postcheckrekening 4407.30 van penningmeester M. Vincke, steenweg op Maele 124, Brugge. Sluitzegels zijn reeds verkrijgbaar à 7 fr. 't honderd.

#### ONZE CURSUSSEN.

De eerste reeks leergangen van het Kursa Centro vereenigt meer dan 600 deelnemers in 30 cursussen. Sommige cursussen zijn niet naar wensch geslaagd, wat denklijk te wijten is aan onvoldoende samenwerking tusschen het K. C. en de plaatselijke medewerkers. Deze laatsten zetten doorgaans de propaganda te laat in of verzuimen het K. C. over plaatselijke toestanden in te lichten. Voor de tweede reeks zijn een veertigtal cursussen in voorbereiding. In 't vervolg rekenen wij ten volle op de medewerking onzer plaatselijke helpers.

#### EEN KORESPONDA CORSO

wordt door het K. C. georganiseerd, bedoeld voor personen die in de onmogelijkheid verkeerden een onzer Ce-cursussen bij te wonen. Inlichtingen verschenen in het Septembernummer van F. E. Echter mag in geen geval de Koresponda Corso iemand van een Ce-cursus weghouden!

---

## **“Hier Dinaso” over Esperanto \_\_\_\_\_ \_\_\_\_\_ of een Blinde over Kleuren**

In nr. 47 van «Hier Dinaso», weekblad van het Verbond van Dietsch Nationaal-Solidaristen, vonden we onderstaand artikel ter inleiding van een uittreksel uit «De Bazuin» (Nederlandsch Katholiek tijdschrift) van 8 October 1937.

Het uittreksel uit «De Bazuin», een eenzijdige voorstelling, willen we hier buiten beschouwing laten in de overtuiging dat onze Katholieke en Rijks-Nederlandsche geestgenooten wel voor een passend antwoord hebben gezorgd. Wij beperken ons dus bij de inleiding van H. D. welke, met vernoemd uittreksel, als documentatie (!) wordt gepubliceerd. Het stuk is te kostelijk opdat we het door samenvatten zouden verminken. Hier gaat het dan ook ongewijzigd:

#### ESPERANTO EN VRIJMETSELARIJ.

De Sowjet-ster is evenals de Esperanto-ster een maçonniek symbool.

Nog steeds worden de leuzen der Fransche revolutie door de bonzen aangewend om de argelooze volgelingen aan het lijntje te houden. Gelijkheid beteekent vervlakking; alle menschen zijn gelijk, alle volkeren zijn gelijk, dus: geen grenzen meer! Dus, — het is maar een stap — één wereldtaal! En sluwweg noemen ze dat ook: hulptaal!

Er is nog een tweede argument voor de wereldtaal: «Hoe practisch! En hoe gemakkelijk!» Ja, het zou ons verwonderd heb-

ben moest men in dezen tijd van materialisme, van militarisme en leelijkheid, dit argument niet hebben aangewend. Nu roodhuiden en negers een colbertjasje dragen; nu de moderne wijken van Oslo en van Sjanghai niet uit elkaar te houden zijn; nu moest het Esperanto dat even leelijk als stom-gemakkelijk is, gelanceerd worden.

Doch er is meer. De uitvinder van deze «taal» voor robotmensen is Dr. Zamenhof, Jood en vrijmetselaar... En dit verklaart onmiddellijk waarom Esperanto niet die ongevaarlijke en belachelijke liefhebberij is, waarvoor velen het houden. Dat zoo-veel Katholieke politiekers daar gansachtig inloopen verwondert niemand. En dat het V. N. V. in zijn blad voor Esperanto propageert en dat het zijne lokalen voor cursussen openstelt ligt in de lijn van dit «hopeloos geval».

Onder bovenstaande titel nu schrijft Frans Armand een belangwekkend artikel in het Nederlandsch Katholiek tijdschrift «De Bazuin» (8 Oct. 1937) waaraan wij onderstaand uittreksel ontleenen:

L. P.

(Hierop volgt dan in H. D. vernoemd uittreksel).

Dat Esperanto bij Verdinaso niet goed staat aangeschreven, verwondert ons geenszins; maar dat H. D. deze houding denkt te moeten motiveeren door onnauwkeurige en zelfs onware argumenten, kunnen we niet onopgemerkt laten voorbijgaan.

De Esperanto-ster een maçonniek symbool? Geen teeken is wellicht zóó verspreid, en alle organisaties die de ster als herkenningsteeken hebben voor Sowjetisch of maçonniek verslijten is, op zijn minst genomen, gewaagd. Dat de Esperanto-ster, dit maçonniek (!?) symbool, o.a. ook in het bisschoppelijk wapen prijkt van Mgr. Dr. Anton Eltschkner, moet H. D. wellicht een toppunt vinden. Overigens biedt het Sion-teeken (twee in elkaar gewerkte driehoeken) slechts een betrekkelijke gelijkenis met de vijfpuntige Esperanto-ster. Ook komt o.i. niet zoozeer de vlag, maar wel de lading in aanmerking, en dat de Joden een zeer onaanzienlijke rol spelen in de Esperanto-beweging spruit denkelijk voort uit het idealistisch karakter dezer beweging waarin materialisme ver te zoeken is.

Geen grenzen meer? Dergelijke leuze is de Esperanto-beweging vreemd. Wel: geen taalgrenzen meer door het invoeren van Esperanto als *tweede* taal voor ieder. Overigens, wat het afschaffen van politieke grenzen betreft, schijnt het Verdinaso zich daar eenigszins te willen aan «bezondigen» — geenszins het Esperanto.

Hoe practisch! En hoe gemakkelijk! Dient daarom Esperanto te worden geweerd? Volgens H. D. dient niet een practische en gemakkelijke oplossing te worden aanvaard, wel een onpractische en moeilijke?! Wij begrijpen niet goed.

Esperanto leelijk en stom-gemakkelijk? Wat beweerden Max Müller, Meillet, Tristan Bernard en andere taalkundigen met wereldfaam ook weer? Hoe luidde — over de welluidendheid van Esperanto — het oordeel van de conferentie van paedagogen wel-

ke op uitnoodiging van den Volkenbond te Genève plaats greep? Hier tegenover stelt H. D. zijn vakkundig (?) oordeel: icelijk. Wat de stom-gemakkelijkheid betreft, men raadplege de kandidaten voor het B-examen. Neen, geachte redactieleden van H. D., Esperanto is niet gemakkelijk (wel: gemakkelijker dan andere talen), omdat het een taal is en niet een «taal».

De Esperantisten robot-menschen? Waarom dan dergelijke benaming niet geven aan al wie zich de middelen, door wetenschap en techniek geboden, ten nutte maakt?

Zamenhof Jood en vrijmetselaar! Kenschetsend dat men met dergelijke argumenten (?) de *degelijkheid* van Esperanto betwisten moet! Dat Samuel Morse van Joodsche afkomst was, heeft bij ons weten nog geen een Dinaso belet een telegrafisch bericht te zenden. Zamenhof was een vrijzinnig Jood, geen vrijmetselaar. Dienaangaande raden wij aan H. D. ter lezing een der biografiën van Dr. Zamenhof. Ook mogen de Esperantisten van geluk spreken dat de auteur van Esperanto 'n Jood was, anders ware, volgens H. D., het een «ongevaarlijke en belachelijke liefhebberij gebleven!» Voor menschen die alle kwaad uitsluitend Joden en vrijmetselaars toeschrijven, is het moeilijk de brilglazen onbeslagen te houden! Wat echter H. D. niet schijnt te weten is dat niet alleen Katholieke politiciers in dezen joden-valstrik liepen. Immers Paus Pius X liet zich letterlijk als volgt uit: «Ik zie in Esperanto een waardevol middel om de eenheid onder de Katholieken der geheele wereld te bevorderen». Kardinaal Van Rossum, prefekt der propaganda: «Esperanto van Dr. Zamenhof zal aan de Kerk groote diensten bewijzen». Kardinaal Van Roey, bij de ontvangst der Katholieke Esperantisten in het aartsbisschoppelijk paleis te Mechelen: «Ongetwijfeld is Esperanto een der voornaamste middelen om de vrede onder de volkeren te bereiken». Wij zullen ons bij deze drie verklaringen beperken. Moest H. D. er echter aan houden, dan zijn we bereid heel wat meer sympathiebetuigingen te publiceeren w.o. van vooraanstaande Protestanten, Staatslieden, Vorsten, enz. Maar wat zou het baten? H. D. is er immers van overtuigd dat al deze menschen er «gansachtig» inliepen.

Als Vlaamsche Esperantisten, als aanhangers van het stom-gemakkelijke Esperanto, m.a.w. als volslagen stommelingen, houden wij het Verdinaso *niet* voor een «hopeloos geval», maar zijn er van overtuigd dat de leiding, met het oog op het nut dat Esperanto als tweede taal aan het viertalige moederland van het toekomstige Dinaso-rijk of Dietsch Imperium bieden kan, in 't ver-  
volg ook hâar lokalen voor onze cursussen zal openstellen.

E. C.

---

## Por niaj sekcioj LA GRUPBIBLIOTEKO

Estas fakto ke ĝenerale nur malgranda estas la nombro de la Esperanto-grupoj kiuj posedas bibliotekon bone organizitan kaj bone funkciantan; pluraj grupoj eĉ tute ne havas bibliotekon aŭ

posedas kelkajn librojn kiujn en longe forgesitaj tempoj oni iam aĉetis de la grupa kaso sed kiuj nun troviĝas ie ĉe la sekretario, la kasisto aŭ la prezidanto hejme, sed neniam estas legataj, pro la simpla kaŭzo ke ilia ekzistado ne plu estas konata de la plejmulto de la klubanoj.

Tamen, kiel valora helpo, kia bona materialo por interesaj grupvesperoj, kia utila ekzercado por perfektigi en la lingva praktiko, kiel riĉa fonto de praktikaj konoj, de agrablaj kaj lernigaj distraĵoj estas por la klubmembroj la legado de bone elektitaj esperanto-libroj!

Jes, certe, la regula funkciadigo de biblioteko ofte okazigas multe da peno kaj laboro. — Ofte mankas la kapabla aŭ la sindonema persono por sin okupi pri ĝi; — oni perdas multe da tempo dum la pruntedonado de la libroj kaj la grupkunvenoj estas mallongaj; — oni ne ĉiam disponas pri taŭga loko en la klubejo por meti la librojn; — ofte librojn perdiĝas aŭ difektiĝas.

Sed tamen, mankas multe en Esperanto-klubo sen biblioteko. — Ĉu en ĉiu sekcio ne troviĝas iu kiu volus sin dediĉi al la tasko de bibliotekisto? Jen maniero por interesigi plian membron al la vivo de via klubo; en bone organizita grupo la eble plej multe da membroj havas sian funkcion kaj respondecon. — Ne gravas se je la komenco li ne estas spertulo, se li nur havas iom da libertempo kaj la necesan bonvolecon, se nur li mem ŝatas librojn. — Kaj ne estas nepre necese okazigi la pruntedonadon de la libroj dum la kutimaj kunvenoj, oni povas fiksi regulajn tagojn kaj horojn por tio. — Kaj se la bibliotekisto bone tenas kompletan katalogon de ĉiuj siaj libroj (kuranta numero-titolo-numero de la libro-prezo-dato de la akiro-aŭtoro-rimarkoj) kaj kartojn, unu por ĉiu membro de la grupo (numero de la libro — dato de la pruntedono — titolo de la libro-dato de ricevo), bone ordigitajn en skatolo, ne multaj libroj perdiĝos. — Kaj ne gravas se la libroj uzdifektiĝas dum la legado; malmultekosta bindaĵo kun rigida kovrilo el kartono tamen multe plilongigas la vivon de la libroj.

Por tiuj grupoj kiuj, malgraŭ ĉio, ne sukcesas bone funkcii sian bibliotekon, mi volas citi la ekzemplon de unu el niaj sekcioj kiu, post interkonsento kun la estraro de publika komunuma biblioteko, *pruntedone* cedis sian librotrezoron al tiu biblioteko. La libroj estas provizitaj de verda glumarko kiu, krom la nomo de la esperanta-grupo kaj la verda stelo, mencias ke tiu libro apartenas al tiu klubo kaj estas pruntehavebla je la prezo de 0,25 fr. — De tiu sumo, la biblioteko deprenas 0,05 fr. por sia kaso por administraciaj kostoj. La aliaj 0,20 fr. estas por la klubo, kiu devas utiligi ilin por aĉeti novajn librojn, kaj tiamaniere nun disponas pri tute aparta fako en la komununa biblioteko.

Tiu sistemo, kiu metas la esperantan legaĵon je la dispono de la publiko kaj, per aparta katalogo, atentigas pri la esperanta literaturo, estas certe imitebla en multaj okazoj.

Konsilinde estas, antaŭfiksi en la kontrakto inter Esperanto-grupo kaj Biblioteko, klaŭzon pri translaso de la libroj en la okazo se la Esperanto-klubo eventuale poste ĉesiĝus; plejofte la biblio-

teko postulôs por si la rajton de maŝtreco, almenaŭ ek de dek jaroj post la ĉesigo de la esperanta-klubo. — Tiuokaze la klubstatutoj kompreneble ne enhavu, kiel ofte okazas, klaŭzon difinante ke la Ligo akiras la posedon de la kluba-havaĵo post eventuala ĉesigo de la sekcio, sed esceptu la librojn de tiu translaso.

La sekcioj certe scias ke ĉiuj libroj estas akireblaj ĉe la Flandra Esperanto-Instituto, kiu konsentas rabaton al niaj sekcioj.

*De Troeyer*  
Grupkonsilanto.

---

## DIVERSAĴOJ

---

### UNIVERSALA ARTA LIGO.

Sub tiu titolo fondiĝis nova mondorganizo. Ĝi alvokas la artistojn de ĉiu nacio al aliĝo. Celo de l' Organizo estas: aranĝo de internaciaj ekspozicioj, kreo de artistaj hejmoj, laborejoj, muzeoj, helpo al reciprokaj interŝanĝvojaĝoj de fremdaj artistoj kaj artamikoj. En la unuopaj landoj fondiĝos landaj grupoj, kun memstrara gvidantaro, kies delegitoj reprezentas la landan grupon en la centra gvidantaro, kies sidejo estas en Parizo. Tiu, kiu volas aliĝi aŭ akceptas la taskon fondi landan grupon, skribu al jena adreso: Ervin Preiss, redaktoro de «Mondo de l' Artisto» (Organo de Universala Arta Ligo), Budapeŝt VII Szövetség-u. 28/b.

### NEDERLANDA OFICEJO «ESPERANTO EN LA LERNEJOJ».

La 2-an de oktobro fondis suprenomitan oficejon sekvantaj Nederlandaj E-Organizoj: Federacio de Laporistaj Esperantistoj en la regiono de la Nederlanda lingvo, la Nederlanda Katolika E-ligo: Nederlanda Katoliko, la Nederlanda Kristana E-ligo: Nederlandsche Kristelijke Esperanto-Vereeniging kaj la neŭtrala Nederlanda E-asocio: La Estonto Estas Nia. Kunlaboros ankaŭ la Nederlanda sekcio de la Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj. La oficejo petas al la tutmonda Esperantistaro la alsendon de necesa materialo (E-gazetoj, broŝuroj, priesperantaj artikoloj, gravaj komunikoj laŭ propaganda vidpunkto, jarlibroj k. t. p.) La oficejo esperas ke en aliaj landoj stariĝos similaj oficejoj.

**KURSGVIDANTOJ** atentu! Ni helpas al vi dum la kurso kaj sendos donacon por viaj lernantoj. Skribu al K. Kalocsay, Hungarujo, Budapeŝt VIII. Mária-u 34.

Ĉi-sube ni represas leteron de la Nieuwpoorta-Grupo skribita al la komitato de la 34-a Eŭkaristia Mondkongreso en Budapeŝt okazonta en 1938.

Tre Estimataj Sinjoroj,

Kun granda plezuro ni legis en Heroldo de Esperanto vian

decidon akcepti Esperanton kiel helplingvo de via kongreso.

Multaj familioj en nia lando adoptis Hungarajn infanojn en la malfacilaj postmilitaj jaroj. Ili verŝajne profitos la okazon por viziti la patrujojn kaj la parencojn de siaj adoptuloj, sed la Hungara lingvo ne estas lernebla por ni. Ni do uzu la mirindan helpilon Esperanto kiun facile povas lerni Hungaroj kaj Flandroj. Kun ĝojo ni faros propagandon por via entrepreno se vi bonvolus sendi al ni la necesajn propagandilojn en Esperanta lingvo.

Ni deziras grandan sukceson al via kongreso kaj petas vin akcepti la esprimon de nia atestimo.

Nome de la Esperantista Grupo el Nieuwpoort.  
Longastrato, 6.

---

## GRUPA VIVO

---

### ANTVERPENO FLANDRA GRUPO ESPERANTISTA

Organizinte Libroservon, la Flandrema tute ne malpravis: la faktoj ja povas atesti pri tio; ankaŭ la Ludvesperoj, dank' precipe al la tabla teniso, estis sukcesplenaj... Ni daŭrigu nian penadon en tiu direkto: estas ja aĵoj kiuj kontribuas al la Afero pli ol ni pensas.

Kaj nova laboro atendas nin je la turno de la vojo: baldaŭ ni festos Kristnaskon: la festo devas iĝi okazo por kunigi Esperantistojn kaj Eksterulojn, ekzemple por pruvi ke en esperantista animo ekzistas kaj vivas aliaĵo ol nura propagandemo, ol nura varbadinklino. Kristnasko estas ja la festo de la Paco: ĉu la tuta Esperantismo ne estas inspirita de la ideo de la Paco inter la Homoj?

La grupajn kunsidojn ĉiam ĉeestis multnombraj anoj: ĉar la tagordoj jam iomete pli mallongiĝis, ni lernas novajn ariojn, viglajn kantojn kiuj estos nia provizo por la venonta ekskurssezono...

BRUSSEL. — N. E. L. E.

En nia kurso partoprenas 14 personoj. Tiu nombro estas malgranda rilate al niaj propagandaj klopodoj. Nia sekcio tamen ne malkuraĝiĝas kaj la 4-an de novembro ĝi organizis provlecionon por V. O. V. (Vlaamsche Onderwijzers Vereeniging). Tiun provlecionon ĉeestis 30 personoj i. k. tri inspektoroj de la oficiala instruado. La ĉeestintoj unuanime estis entuziasmitaj kaj la gvidanto de la provleciono, s-ano F. Buenting el Ned.-Indujo devis akcepti merititajn gratulojn. La estraro de V. O. V. organizos Esperanto-kurson por sia anaro komence de Januaro.

LEUVEN. — KRISTNASKA REGIONA KUNVENO.

Por jam antaŭ la fino de la kursoj enigi la kursanojn en la movadon, «La Nova Tagiĝo» decidis aranĝi *kristnaskfeston*, Dimanĉe, la 26-an de Decembro. La kursanoj de la kursoj de F-ino Nedergaard estos invitataj, nome la kursoj de Leuven, Wijgmaal, He-

rent, Bertem, Tervuren, Tienen kaj Diest. Oni vidas ke en kvin el tiuj sep lokoj ne jam estas grupo, oni do tie devos fondi grupon. Ni insiste petas ĉiujn grupojn, ke ili venu al tiu kunveno: des pli multope oni ĉeestos, despli efika estos la propagandado.

Jen ĝeneralaj aranĝoj:

*Matene:* Gaja kunveno de la Esperantistoj, je la 10-a en la granda salono de «Flandra Domo».

*Posttagmeze:* je la 3-a, Gajega kunveno de Esperantistoj kaj kursanoj.

*Vespere:* Eksterordinare gaja vespero kun kantado, dancado, kaj kolosa loterio!

Ĉiuj aranĝoj okazos en la salonoj de la «Flandra Domo Cou-tereel» 71, Bondgenootenlaan, Leuven.

Ĉiu Esperantisto rememoru la daton: 26-an DE DECEMBRO.

Sed la Lovena kri'

Ĉin ne forgesos ni:

«In Leuven is het zoo plezant!»

Kaj vivu Esperant'.

#### MOL. — ESPERANTISTO GRUPO.

Nia juna sekcio tre vigle laboras. Ĉiu monato ni havas kunvenon dum kiu ni diskutas kaj kelkfoje eĉ disputas sed, feliĉe, ni ĉiam repaciĝas. La gvidanto de nia rondo donas klarigojn pri gramatikaj malfacilaĵoj; kelkfoje ni legas flandran tekston kiun ni hejme devas traduki en Esperanton, tiujn tekstojn ni korektas en sekvontaj kunvenoj.

Antaŭ kelkaj semajnoj ni havis la plezuron revidi kaj reakcepti en nia medio, nian ŝatatan instruiston Fr. Heidler. Li interese rakontis pri la Varŝava kongreso kiun li partoprenis. Ni deziras al nia kara instruisto bonan sukceson en Okcidenta Flandrujo, kien ĉi jare lin sendis la Kursa Centro de F. L. E.

#### VERDA STACIO.

##### *Programo por la monato decembro:*

2-a decembro (22.35 — 23.45 MET) Praha I, BRNO, Moravska-Ostrava: Amuza horeto pri la poezio de l' vintro (muziko, deklamado, kantoj, k. t.p.).

7-a decembro (18.00 — 18.10 MET) Moravska-Ostrava:

Jozefo Zlamal: Kiel la primitivuloj imagas la ĉielon?

14-a decembro (18.00 — 18.10 MET) Moravska-Ostrava:

Dro Ferdinand Stiebitz, profesoro de la Masaryk-Universitato: La sortoj de la antikvaj diktaturoj kaj diktatoroj. — La diktaturo en Romo.

21-a decembro (18.00 — 18.10 MET) Moravska-Ostrava:

Libronovaĵoj de la Moraviaj E-Pioniroj kaj de Literatura Mondo.

28-a decembro (18.00 — 18.10 MET) Moravska-Ostrava:

Dro Emil Bayer, altlerneja profesoro:

Ĉu la vivo estas efektive batalo? — «Vivaj vortoj».

Sciigo: Okaze de la disaŭdigo de la opero «La Kiso» de B. Smetana, radio Brno ricevis 840 alskribojn el 27 landoj.



## ANGULO DE LA SERĈEMULO - SOLVOJ

PROBLEMO 35. KRUCVORTO. — *Horizontale.*

Ekart, arako, stamp, dom. eburo, aparti, forta, ekipi, kaĝ, kor, kol, ost, trov, lam, lip, elir, ok, ik, paper, ol, di, enui, rio, oper, anagram, pacifik, aglo, ovo, knab, ek, ro, orelo, in, ie, gado, iro, dmd, teda, uzi, sag, bon, net, sigel, infer, ograr, navet, aer, karul, radio, baril.

*Vertikale.*

Aktor, negus, spark, kazin, etaĝo, ena, digar, kat, vinagro, Eva, amik, kuglo, sled, r. p., ol, iro, ia, di, frap, orgi, do, marmoro, n. a., vork, pi, ve, afer, m. d., Leopold, er, akir, ombr, re, op, O. C. K., do, K. A., abel, opini, noar, kuk, elefant, gri, oriol, rib, enul, apsid, ideal, itrio, teatr.

PROBLEMO 36 DIVIDO.  $24266370 : 998 = 24315$ .

*Slosilvorto* = DR. ZAMENHOF.

PROBLEMO 37. — VORTSERĈADO.

Ano, anino, anso, aro, (grupo) aro (mezuro) ario, aso, ino, ina, inaro, io, ia, iro, naso, ni, nia, oni, ori, ora, rano, ranino, raso, rosi, rosa, sano, si, sia, sino, sina, sinaro, soni, nano. (32)

PREMIOJ.

Por problemo 35 gajnis (vortaron) S-ro Bogaerts.

Ricevas konsolpremion: Finoj: Keveryn, Mordvynova, Van Der Mast. Sroj: Van Gindertaelen, Van As, Pollet, Verheyden, Vermuyten, De Groote, V. D. Horst, Couwenberg, Yserentand.

Por problemo 36 gajnis premion: De Groote.

Por problemo 37 gajnis premion: Van Gindertaelen.

### NOVAJ PROBLEMOJ

Por ĉiu problemo ni forlotumos unu premion. 8/10 ajn de la poentoj donas partoprenrajton al tiu lotumado. La difinoj kun (R) estas radikvortoj. La solvoj estu sendataj antaŭ la 5-a de Januaro 1938, rekte al Sro F. Volders, Bredastraat, 94, Antwerpen.

PROBLEMO 40 KRUCVORTO.


*Horizontale.*

- 1) Homo kiu forlasas sian religion aŭ partion. (R)
- 2) Egala. (R) — sin meti en akvon. (R)
- 3) Titolo de esp. libro. (orienta romano). — Supernatura estaĵo en formo de flugilhava virbovo kun homa kapo. (R)
- 4) Inklini. — perfekta horizontala ebeneco. (R) — nobelo. (R)
- 5) Riverego en Italujo. — paroli. (R) — Fabela estaĵo kun supernatura povo. (R)
- 6) Ĥemia elemento, metalo. — oficiala oficisto. (R)
- 7) Mordeti. (R) — malaltaĵo. (R)
- 8) Malgranda ĝermo de la embrio, el kiu formiĝas fetu aŭ ovo. (R) loge penanta plaĉi. (R)
- 9) Prefikso. — sufikso (adj.), virina nomo. — Prepozicio.

- 10) Pron. pers. — malmoliĝinta ekstera parto de certaj manĝaĵoj. (R) — nenatura. (R)
- 11) Ĥemia elemento, metalo. (R) — dombesto.
- 12) Submetiĝi. (R) — marfiŝo. (R)
- 13) Sameĉo. (R)

*Vertikale.*

- 1) Fina parto de verko.
- 2) Dieto de la amo. (R) — ordono.
- 3) Glitilo. (R) — ordono. — marŝo.
- 4) Perforte forpreni ies posedaĵon. (R) — manfarita Dio. — arbo. (R)
- 5) Eliĝi nevidebla. (R) — imaga abstrakta koncepto. (R) — miksi paston per la manoj. (R)
- 6) ĝojmonro. — movi ion al si.
- 7) Malgranda. (R) — pron. pers. — numeralo — prepozicio.
- 8) Interno de frukto. (R) — kapvesto. (R)
- 9) Insekto. (R) — birdprodukto. — malnokte.
- 10) Pezo de envolvo. (R) — batalkomenco. — esp. idealo. (R)
- 11) malkovra, (R) — vojo ombrita per arboj. (R) — esti blanke varmega. (R)
- 12) Vagonparto. (R) — Planedo.
- 13) Genro de kruciferoj. (R)



PROBLEMO 41. — ADICIO. (5 poentoj).

S E P    Sangŭ en tiu-ĉi adicio, la literoj per la necesaj ciferoj,  
 + T R I    roj, se vi scias ke SEP kaj TRI estas divideblaj per  
 -----  
           9.

D E K

# Flandra Esperanto - Instituto

Vereeniging zonder Winstbejag

Magdalenastraat, 29, KORTRIJK

Postĉekkonto: F. E. I. 3268.51 — Telefono: 1654

EL LA PREZARO:

La Viro el Francujo — Ivans	29,—	bind
Gösta Berling — S. Lagerlöf	55,—	»
Riĉa kaj sen Mono — Oppenheim	29,—	»
La Ora ŝtuparo — Oppenheim	29,—	»
Si — H. Rider Haggard	29,—	»
Petrolo, vol I — U. Sinclair	29,—	»
Petrolo, vol. 2 — U. Sinclair	29,—	»
Luno de Izrael	29,—	»
La Dormanto Vekiĝas	29,—	»
Pallietier — F. Timmermans	28,—	»
La Leono de Flandrujo — H. Conscience	32,—	»
Tra la Labirinto de la Gramatiko	40,—	»
Elektitaj Noveloj — Lode Baekelmans	7,50	broŝ.
La Du Amatinoj — de Musset	7,50	»
La Mono de S-ro Arne — Selma Lagerlöf	12,—	»
Gösta Berling — S. Lagerlöf	45,—	»
La Homaj rasoj de la Mondo	24,—	»
Kudlago, la malgranda eskimo	5,—	»
La Verda Koro — Baghy	16,50	»
Stranga Butiko. — R. Schwartz	10,—	»
Maria kaj la Grupo. (L. M.-Libro)	22,—	»
Konversacia Literaturo (Cseh-metoda)	12,—	»
Fundamenta Krestomatio — Zamenhof	20,—	»
Leerboek voor Esperanto (geill.) — F. Szilagy	12,—	»
Examenopgaven	10,—	»
Muusses E-Biblioteko (10 volumetoj)	41,—	»
Het Esperanto in 10 lessen — Witterijck	5,—	»
Zakwoordenboekje (2400 stamwoorden)	2,50	»
Schildlof Zakwoordenboek	25,—	bind
Groot Woordenboek Van Straaten	80,—	bind
Beknopt Woordenboek Van Straaten	40,—	bind
Plena Vortaro de Esperanto	84,—	bind
Flandra Esper. 3-a, 4-a, 5-a kaj 6-a jarkolektoj	15,—	broŝ.
Flandra Esperantisto, 1-a jarkolekto (sen la no 1)	10,—	»
<b>INSIGNOJ:</b> Malgranda verda stelo:	2,—	
Verda stelo, sur blanka fono:	3,—	
Verda stelo, sur blanka fono:	3,—	
Granda verda stelo, kun blanka rando:	4,50	
Flandra kaj Esperanta flagetoj:	5,—	
Ĵrajono kun surpriso «Esperanto»:	1,—	
Leterpapero kaj kovertoj por 20 po	3,—	
Poŝtkartoj: por 10 po	1,—	

OSTENDO

## HOTELO METROPOLE

Kerkstraat, 32

75 komfortaj ĉambroj kun fluanta akvo, varma kaj malvarma. Centra hejtado. Lifto. Aŭtomobilejo. Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

## MODERAJ PREZOJ

S-ano Snykers havas la plej bonajn rekomendojn kaj persone direktadas.

## DRUKKERIJ

Aŭtomata Presejo

## H. BRAEKEVELT

Statedreef, 177, Roeselare.

Posedas vastan klientaron en la flandraj provincoj.

Presejo konata pro sia belgusta kaj moderna preso.

Liveras al la diversaj esp. grupoj kaj ligoj. Sendevige petu prezoferon kaj modelojn.

Tel.: 1080.



Proksime de la naĝejo (200 m.).

## “BREUGEL”

SPIJS- en DRANKHUIS

Em. Jacquainlaan, 37, Brussel

Lekkere Dranken

Fame konata pro siaj bongustaj kaj malmultekostaj manĝoj.

Ejo de N. E. L. E.

(Brusela grupo Esperantista)

## VARBU

## ANONCOJN!

## Café Nieuwe Carnot

FRANS NEEFS-D'HELDT

Carnotstraat, 70 — Antwerpen

Plej bonaj trinkaĵoj.

Salonoj por societoj — Malvarmaj

manĝaĵoj — Bonega servado.

Ejo de Flandrema Grupo.

## St. MARIABURG

10 KM. DE ANTVERPENO

## Grand Hotel de la Chapelle

lokita en arbarĉirkaŭaĵo

ĉia moderna komforto — aŭtomobilejo

laŭteniso — infanludejo — teraso

Restoracio — Familia pensio

N. B. - Elektita loko por ekskursaj celoj

Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

Wwe VAN HAVER-DE BOES